



LA FAKTORO "POTENCO" EN LA HISTORIO.

(Per la signifo de la vorto "faktoro" vidu la antaŭan artikolon)
Depost la komenco de la historio de l'homaro ĝis la nuna tempo (kaj ni ne havas motivojn por kredi ke tio baldau ŝanĝos) ni vidas i.a. la jenon: kiu havas potencon klopodas plivastigi ĝin kaj la subuloj klopodas liberigi sin de ĝi per kunlaborado - se necesas - kun aliaj kontroloj de la supra nomita potenco. Tiu fakto okazigis reciprokejn interpaĉigojn kaj reciprokejn interbataladojn ofte tre strangajn kaj tute ne atenditajn.

En la antaŭa artikolo ni petis vian atenton por la geografia faktoro kaj ni tutspeciale montris ĝin en la historio de la antikvaj popoloj. Ĉiuj tiuj popoloj vivis en la tiel nomita civilizcirklo t.e. sur la bordo de la Meza Maro, en la oriento de ĝi. Ekzistis kelkaj trafikvojoj kiuj kunligis tiujn landojn. Nu: la dua motivo kial batali, krom la unua kiu estis la bataleno kaj ano al kontrolo de l'antikvaj reĝoj; la dua motivo kial batali estis diktata de ekonomia neceso; por altiri ekonomiajn avantaĝojn kaj por doni ekonomiajn profitojn al siaj lando kaj popolo, ofte en la malavantaĝo de la aliaj popoloj, la antikva reĝo volis estri tiujn trafikvojojn. La relative malmultaj skribitaj dokumentoj kiuj povas instrui nin pri tio, klare montras tion. Kaj por la sama celo ili ofte ne kontentigis sin per la estrado sur la trafikvojoj sed ofte nur estis kontentaj kiam ili tutsimpe estris ankaŭ tute la aliajn landojn.

Multe pli da skribitaj dokumentoj konserviĝis por instrui nin pri la Mezaĝoj. Plej grave estis la politika potenco. Nur je la finiĝo de la Mezaĝo la ekonomia potenco estis egale grava. Per kelkaj ekzemploj ni montras nun tiun ludon de la potencoj.

En 962, Otto I-a la granda, starigis la Sanktan Roman Germanan Imperion de kiu li estas la imperiestro. Sub lia aŭtoritato regnas en Germanujo multaj reĝoj kies estro li estas: ekz. la reĝo de la Saksoj en Saksujo ktp.

Tiuj reĝoj montras tuj eĉon pli kaj pli sendependiĝi de Otto. Kontraŭ tiu tendenco Otto devas lukti: tial, kiam kelkaj reĝlandoj troviĝas sen monarĥo (ĉar ekz. la reĝa familio mortas sen posteuloj) li donas tiun tronon ne plu al nonda potenculo sed al altranga ekleziano, al episkopo. Ĉiufoje kiam tio okazas estas ankoraŭ unu reĝo malpli kiu luktos kontraŭ liaj aŭtoritato kaj influo. Kaj li estas certa pri la servoj kaj la serveno de tiuj reĝoj-episkopoj kiuj dankas al li la estradon sur reĝlando kaj konsekvence dankas al li potencon kaj riĉecon. Tiuj reĝoj-episkopo estas fidelaj servistoj de la germana imperiestro. Sed aliflanke la germana imperiestro, post mallonga tempo, ne nur linigas sian aŭtoritaton pri la mondaj aferoj en tiuj episkop-reĝlandoj sed ankaŭ en sferoj de spirita, religia ordo, kiam la imperiestro donas al episkopo la glavon kaj sceptron, simbolojn de nonda potenco, li donas ankaŭ la kurbobastonon kaj ringon, la simbolojn de spiritreligia potenco. Je iu momento la plej influhavantaj Papoj de la Mezaĝo volas radikalan reformadon en tiuj kaj aliaj fikutinoj kaj ĝi estis la "investigbatalo" (investiturstrijd) bone konata en la historio. Du partioj staras unu kontraŭ la alia. La germana imperiestro kaj la episkopoj-reĝoj kontraŭ la Papo kaj la germanaj reĝoj kiuj volas helpi la Papon por nenigi la potencon de ilia estro: la germana imperiestro. La plej alta grado de tiu interbatalado estas kiam la Papo ekskomunias la germanan imperiestron. Tio, laŭ la tiutempa juro, komplete liberigas la subulojn de ĉiuj devoj je la estro. Vi eble ankoraŭ memoras ke unu de tiuj germanaj imperiestroj Henriko VI-a devis sekve de tio, piede iri kaj dum tri tagoj atendi al pordego de la kastelo en Kanossa por ricevi pardonon de la Papo. La fina rezulto de tiu batalado estis la preskaŭ komplete nenigo de la potenco de l'germana imperiestro (1050).

Same en Francujo la diversaj grafoj kaj dukoj celis iĝi sendependaj de sia estro; la Franca reĝo. La graflando Flandrujo estis, laŭ jure, parto de Francujo. Estas nur en 1525 per la interpaĉigo de Ma-

drii ke la Franca reĝo Frans I-a, kiu perdis la batalo de Pavia en 1524 kontraŭ Karlo V-a, konsentis cedi ĉiajn rajtojn pri Flandrujo. Sed dum la Mezagoj la francaj reĝoj sukcesis havi pli kaj pli da aŭtoritato je la Flandra grafo. Ili trovis helpon en la urbestroj. Estas tial ke, ĝenerale en nia historio la urbestroj estas konataj lilionoj, anoj de la Franca lilio. Kiel tio okazis? Ĝuste kiel la Flandraj grafoj volis iĝi sendependaj de la francaj reĝoj dum ke tiuj lastaj volis konservi plenan aŭtoritaton sur la grafo, la urbestroj same volis iĝi tute sendependaj de la grafo dum ke tiu ĉi volis gardi sian influon kaj kontrolon sur la urbestroj. Kaj do la du kontraŭuloj de la grafa potenco, la Franca reĝo kaj la urbestroj serĉis kaj trovis unu la alian. La Flandraj urbaj masoj kontraŭe ofte estis mal-kontentaj pro la fakto ke ĝiaj urbestroj neniam volis doni klarigojn pri sia estradmaniero, pri la oftaj kaj gravaj impostoj kaj ankaŭ pro tio ke tiu malultrombra estraro neniam alllasis iun alian en la urbestro. Kaj tiuj masoj subtenas la grafon. Ne ĉian okazis tiel. En la periodo dum kiu la komunumoj ekostas kaj ekorganizas sian vivon ili tre ofte batalis kontraŭ la grafo. La impostoj postulataj de la grafo estis sufiĉe grava malhelpo al dis-vestigado de grandskala komerco. La komercistoj sukcesas ricevi de la grafo diversajn avantaĝojn i.a. malpliigo de imposto, fortikigo de la loko kie loĝas la komercistoj per muroj ktp., la foirrajto kaj finfine la urba statuso. Tiuj privilegioj estis skribitaj sur pergamento kaj bone konservataj. La grafo sendis tian sian anstataŭanton aŭ reprezentanton al tiuj urboj por ke tiu-ĉi respektigu la rajtojn de la grafo. Ofte la anbaŭ partioj disputis ĉar la komunumoj volis pli kaj pli da privilegioj kaj la grafo enis fortiri ilin. Fama estas la revolucio de Brugge kontraŭ Guy de Dampierre post kiam la ligna bel-frido, kiu entenis la valorajn dokumentojn, forbrulis kaj ke la grafo volis profiti la okazon por doni malpli da avantaĝoj al la Bruĝanoj.

& & &
&

(daŭrigota - verkis F. Roose)

HET SPIRITISME. - (5de vervolg) - NATUURLIJKE UITLEG

Ĉar de sceptische stelling dat in het spiritisme alles bedrog of illusie zou zijn kunnen de meeste wetenschapsmensen geen vrede nemen. Als men in de geschiedenis zulk een homogeen blok feiten aantreft, dat den tijd van Mozes met den onzen verbindt, moet men wel besluiten dat het spiritisme een reële ruggegraat heeft; maar de vraag is nu wat die occulte, vreedende kracht eigenlijk is, dat eigenaardige, misschien bovematuurlijke, dat het spiritisme dien langen levensduur schenkt.

Somdige meenen dat die kracht in het medium zelf zou schuilen. Daaruit zou dan volgen dat het spiritisme slechts een hoofdstuk zou zijn van de biologie (levenskunde) of van de mentale pathologie.

In die verschijnselen zou het onderbewuste een groote rol spelen. Dit onderbewustzijn is nu zoo te zeggen een deel van ons zielkundig leven, waarin allerlei zintuigelijke gewaarwordingen werden opgeslagen, die den mensch in zijn gewoon bedrijf niet bereeren en dus in het gewoon bewustzijn geen plaats vinden, en ook niet in het gewone leven tot uiting komen. Enkele voorbeelden ter verduidelijking: we kunnen zoodanig in het lezen van een boek verdiept zijn, dat we volstrekt niet meer weten wat om ons heen gebeurt; toch blijven onze ooren regelmatig reageeren, en de geluiden die ze opvangen, worden in onderbewustzijn gekeldderd. We kunnen ook op wandeling gaan; later zullen we datgene vertellen wat onze aandacht heeft getrokken, al het andere dat onze oogen opgenomen hebben, herinneren we ons niet in het gewone leven. Toch is het opgevangen. Daaruit volgt dat onze waarnemingen, of beter gewaarwording in 2 soorten verdeeld kunnen worden: 1^o - die waaraan aandacht wordt geschonken, en in het gewone leven tot uiting komen, en 2^o - die, waaraan geen aandacht geschonken wordt, maar toch door de zintuigen worden opgenomen en in het onderbewustzijn gekeldderd; die worden enkel bovengenaald in hypnose of mediumieke trance. Dan zal de persoon niet zelden zaken openbaren, die zij normale kennis te boven gaan. Om den voorbeeld aan te halen: een simpele leid van een ouden rabijn, die nooit het Hebreuwsch had gekend, zegt in trance gansche volzinnen op uit den Hebreuwschen Bijbel. Vroeger had ze, en nu heeft ze de macht op te geven, haar meester die zinnen hooren opdreunen.

We hebben ook nog de onbewuste spiertrilling, daardoor woren draaiende kloppende tafels verklaard. Onbewust doen de aanzittenden de tafel kloppen of draaien. Deze uitleg geldt ook voor planchette en automatisch schrift.

Feiten van dubbel zicht o.a. weten wat schuilt in gesloten buidels of keten, verklaren en aanduiden van een ziekte door aanraking van een haarklis

van den ziele enz. kunnen door "gedachtenoverdracht" verklaard worden. In hoofdzaak komt de verklaring hiervan daarop neer: het menschelek denkloven staat in innig verband met de hersenen; onze gedachten komen niet tot stand zonder beelden; deze beelden zijn niet als photographiën, getrokken op gevoelig papier, maar ze berusten op de trillingen die uitgaan van het voorwerp van onze gedachten en die opgevangen worden door het orgaan dat handelt, nade gehuigen of verbeelding; die trillingen planten zich nu ook voort naar buiten; worden die nu in onze hersenen opgevangen, dan verwekken ze daar hetzelfde beeld als datgene vanwaar ze uitgaan. Ter verduidelijking een eenvoudige voorbeeld: ge gaat langs de straat, opeens denkt ge op ieland, en als ge van den duivel... daar staat bedoelde parson voor u. De trillingen die dien persoon uitzond, zijn in uw hersenen gedrongen, en hebben daar hetzelfde beeld geprojecteerd.

Dit zijn de bijzonderste hypothesen die in den laatsten tijd werden vooropgezet. De laatste, die het meest zand opjooeg, is echter die van Dr. Charles Ricket. In zijn werk: "Traité de métaphysique" stapelt die hoogleeraar een reeks streng gecontroleerde feiten opeen waarvoor een uitleg dient gezocht. o.a. voorwerpen die zonder lichamelijke aanraking worden verplaatst (télékinésie), weten wat op verren afstand gebeurt, lezen in de toekomst, het verwekken van schimmen die handelend optreden (Ectoplasma) e.a. Dr. Charles Ricket tracht die te verklaren door nog onbekende krachten te veronderstellen in het organisme van zekere (of alle?) menschen. Hier moet echter opgemerkt worden dat de meeste gecontroleerde proeven (o.a. in de Sorbonne) spaak liepen.

Het domein der verklaring van de spiritistische verschijnselen ligt nog bijna totaal braak.

(wordt vervolgd - bezorgd door A. Claeys)

8888888888888888888

888888888888

LITERATURA ANGULO: saurigo de la tradukado de "Simforosa" de la Flandra verkisto F. Timmermans.

LA PETIRADO.

Simforosa ricevis konsenton de la majstrino por fari la petvojo al la mirakla statueto de l'Sankta Antonio. Ŝi pli ŝatintus iri unu Dillando, sed ĉar la beginoj ne povas forlasi la beginejon dum tiu tago, escepte en danĝero, ŝi ne kuraĝas demandi ĝin al la vikario...

Ŝi nun sidas, kune kun kelkaj personoj, antaŭ la ridetanta statueto ĉirkaŭ kiu brulas kandellumo kaj odoras sambuko.

Estas malvarmeta en la kapelo; larĝe malfermita pordego enlasas sunon kaj odoron de heĝofloroj.

Vasta silento en la preĝejo dum ke ekstere paseroj pasas; briletas argentaj kandelingo kaj kupraj lampoj, kaj unu fratulo kun ĝiba kalva kapo malfermuras antaŭ la altaro Orientan tapiŝon.

Simforosa provas kapti atenton en la preĝon; ŝi fermiĝas okulojn, morda lipojn, sed ĉiofoje ke perdo ekbruas en la koridoro de l'monaĥejo, en sakristio, ke ŝuo krakas, ŝi turnas la kapon al tiuj bruetoj.

Ŝi miras ke Martinus ne aperas; ŝi tiam ŝatintus vidi lin, kvankam ŝi ne al si mem ke ŝi venis tien-ĉi por li.

Tutan rozarion ŝi preĝis, krucvojon ŝi iris, laŭkanonaj horoj kaj dediĉo al la Sanktulo ŝi finlegis. Ŝi sentas kun bedaŭro ke la tempo rapidas kaj ŝi devas frue foriri, ĉar longa la vojo estas tra la kamparoj kaj neniam ŝi povas maltravi la vagaron.

Ŝi ne vidas lin; sentas ŝi en koro; ŝi neniam revidos lin kaj ne plu konsilas la kvietecon de antaŭe pro konstanta pensado al li.

Jan delonge ŝi emas retiriĝi en monaĥinejo kaj tie forgesi la tutan mondon kaj ĉion sur ĝi.

Nun ŝi havas ĉagrenon kaj venas amareco en ŝi. Ŝi sopiris la tutan vinton je tiu tago, ŝi tiam esperis je ĝi kaj rigardis al ĝi kiel maristo al tero.

Kial? Ŝi ne scias. Ŝi estis konvinkita lin trovi kiel fratulon, do ke tiuj vojoj je espero estas fortranĉitaj por ĉiam. Kaj tamen, tamen ŝi volis vidi lin, vidi lin, kontentigi la okulojn, ĝojigi la animon en lia aspekto.

Iĝas tempo por foriri... Ŝi ankoraŭ preĝas dekonon de sia rozario, kaj se li tiam ne ankoraŭ venis, ŝi hejmeniros.

Ŝi malrapide preĝas, sed vane. La dekonon estas finita. Martinus ne ekaperas. Kun barelsona sopiro ŝi surgenas sur la ruĝaj kaj blankaj kandeloj, elmarŝetas la preĝejon, ankoraŭfoje postrigardas al la kverko sakristipordo kaj tiam transpasas rapide la per suno surlumita antaŭgardeneto, por certe ne mal-

SKRIBTALENTOJ DE NIAJ MEMBROJ. - Nia samideano kaj kunlaboranto S-ro K.M. denove ensendis por nia revuo najstran tradukon de kelkaj paĝoj el verkoj de la nondliteraturo. La estraro ĝojas aperigi ĉi suban tekston:

LA ŜNURU.--

verkis Ch. Baudelaire,

tradukis: K.M.

Al Edouard Manet

"La iluzioj, - mia amiko diris al mi - estas eble tiel sennombraj, kiel la rilatoj de l'homoj inter si, aŭ de l'homoj kun la objektoj. Kaj kiam la iluzio malaperas, tio estas: kiam ni vidas la estaĵon aŭ la fakton kiel ĝi ekzistas ekster ni, ni spertas kuriozan sentimenton, konsistantan parte el bedaŭro pro la fantomo malaperinta, parte el agrable surprizo antaŭ la novaĵo, antaŭ la fakto reala. Se ekzistas fenomeno evidenta, triviala, ĉiam la sama kaj pri kies naturo oni ne povas trompiĝi, estas la patrinamo. Estas tiel malfacile supozi patrinon sen amo kiel lumon sen varmo; ĉu tiam ne estas tute legitime atribui al la patrinamo ĉiujn agojn kaj parolojn de patrino, rilatajn al ŝia infano? Kaj, tamen, malkultu ĉi historieton, en kiu ni estis ekstrem mis- tifata de l'iluzio plej natura.

"Mia pentrista profesio instigas min atente rigardi la vizaĝojn, la fizi- onomojn, kiaj prezentigas dumvoje, kaj vi scias kiam ĝuon ni tiras el tiu povo, kiu igas por ni la vivon pli viva kaj pli signifa ol per la ceteraj ho- moj. En la fora kvartalo kie mi loĝas, kaj kie vastaj herbejoj specoj ankoraŭ apartigas la konstruaĵojn, mi ofte observas infanon kies arda kaj malica in- zionismo, pli ol ĉiuj aliaj, tute me legis min. Pli ol unufoje li pozis por mi, kaj mi transformis lin jen en malgranda bonemon, jen en anĝelon, jen en mitologian amoron. Li igis lin porti la violonon de l'vagabondo, la Dornan Kronon kaj la Mjlojn de la Pasio, kaj la Torĉon de Eros. Mi fine trovis tie grandan plezuron en la petolemo de tiu bubo, ke, iun tagon mi petis al liaj gepatroj cedi lin al mi, promesante bone vesti lin, doni al li kelkajn monerojn, kaj ne devigi lin al peno alia ol purigi miajn penikojn kaj fari miajn aĉetojn. Tiu infano, levita, iĝis ĉarma, kaj la vivo kiun li havis ĉe mi ŝaj- nis al li paradizo, kompare al tiu kiun li estus suferinta en la patra domo. Li tamen devas diri ke tiu stulo kelkfoje mizigis min per ekstremaj kri- zoj de malĝojo antaŭtempa, kaj ke li baldaŭ manifestis malmoderan emon al su- kero kaj likvoroj; tiagrade ke foje, konstatante ke malgranda miaj oftaj admo- noj, li estis ferinta novan ŝtoleton de tiu speco, mi minacis lin je resendado al liaj gepatroj. Sekve mi eliris, kaj miaj aferoj sufiĉe longe restis ĉi el la hejmo.

"Kiaj ne estis mia abomeno kaj mia ĉiro, kiam, ĉe mia reveno, la unua ob- jekto kiu frapis miajn rigardojn estis mia stulo, la malica kunulo de mia vi- vo, pendigita ĉe panelo de tiu ŝranko. Liaj piedoj proskruu tuŝis la plankon; tiam li sendube puŝis for per piedo, estis renversita apud li; lia kapo konvulsie kliniĝis sur ŝultro, lia vizaĝo, ŝvelinta, kaj liaj okuloj, tute larĝe apertaj kaj terure fiksj, unue kaŝis al mi la impreson de la vivo. Dependigi lin ne estis tiel facile kiel vi povus kredi. Li estis jam tre ri- gida, kaj bruske faligi lin teren estigis en mi neeksplikeblan malinklinon. Mi devis subteni lian tutan korpon per unu brako, kaj, per la mano de l'alia brako, tranĉi la ŝnuron. Sed, post tio, ne estis finite: la monstreto uzis tre maldikan spagon (1) kiu eniris tre profunde en la karnon, kaj mi devis nun, per ĉizojeto (2), serĉi la ŝnuron inter la du bordetoj de la ŝvelaĵo, por liberigi lian kolon.

"Mi neglektis diri al vi ke mi vagle kredis helpon; sed ĉiuj miaj najbaroj rifuzis asisti min, fiĉelaj en tio al la kutimoj de la civilizita homo, kiu neniam volas, mi ne scias kial, miksi sin en la aferojn de pendigito. Tioe kuracistoj venis kiu deklaris ke la infano mortis antaŭ kelkaj horoj. Kiam poste mi devis malvesti lin per la enderĉaĝo, la kadavra rigideco estis tia ke, malesperante fleksi liajn membrojn, mi devis disŝiri kaj tranĉi la ves- tojn por ilin ĉaŝti de li.

(1) spago: ŝnureto.

(2) ĉizojeto: dubranda tondilo por tranĉi ŝtofon, paperon, ktp.

"La komisaro al kiu, kompreneble, mi devas deklari la akcidenton, rigardis min oblikve, kaj diris: "Jen io suspekta", sendube movata de radikinta deziro kaj profesia kutimo timigi, trafe maltrafa, senkulpulojn kaj kulpulojn.

"Plejlasta tasko restis farando, kies nura penso kaŭzis al mi teruran angoron: oni devis averti la gepatrojn. Miaj piedoj rifuzis konduki min tien. Fine mi havis tiun kuragon. Sed, je mia granda miro, la patrino restis senemocia, neniu larmo gutis el la angulo de ŝia okulo. Mi atribuis tiun strangajn ajon al la abomeno mem kiu ŝi devis senti, kaj mi rememoris la konatan sentencon: "La doloroj plej teruraj estas la doloroj mutaj". Rilate la patron, li nur diris kun niemo duone bruta, duone revera: "Konsidere ĉion, estas pli bone tiel; li ĉian estus malbone finata."

"Lune la korpo sterniĝis sur mia divano, kaj, assistata de servistino, mi okupis min pri la lastaj preparoj, kiam la patrino eniris mian laborojon. Ŝi deziras, ŝi diris, vidi la kadavron de sia filo. Mi varvere ne povis malhelpi ke ŝi ebrigu sin de l'malfeliĉo, kaj rifuzi tiun lastan kaj malluman konsolon. Sekve ŝi petis indiki la lokon kie ŝia filo sin pendigis. "Ho, ne, sinjorino, mi respondis, tio doloras vin". Kaj ĉar nevole miaj okuloj turniĝis al la funebra ŝranko, mi ekvidis en naŭzo miksitaj kun abomeno kaj kolero, ke la najlo estis ankoraŭ fiksita en la pario, kun longa peco de ŝnuro forgesita postlasita. Mi tuj impetis per forpreni la lastajn spurojn de l'malfeliĉo, kaj kiam mi volis ĵeti ilin eksteren tra malfermita fenestro, la mizera virino kaptis mian brakon kaj diris per nerezistabla voĉo: "Ho, sinjoro, lasu tion al mi, mi petas, mi petegas!" Ŝia malespero, sendube, ŝajnis al mi, tiel frenezigis ŝin ke ŝi nun anaplenigis per kio servis kiel instrumento de la morto de ŝia filo kaj volis konservi ĝin kiel abomenan kaj karan relikvon. - Kaj ŝi proprigis la najlon kaj la spagon al si.

"Fine, fine, ĉio estis plenumita. Mi nur rec eklaboru, ankoraŭ pli rigle ol kutime, por peli ĉion post ion for tiun kadavreton kiu sieĝis la volvojn de mia cerbo, kaj kies fantomo tedis min per siaj grandaj fiksitaj okuloj. Sed, la postan tagon, mi ricevis anason da leteroj: la unuaj de l'luantoj de miaj domoj, kelkaj aliaj de domoj najbaraj; unu de l'unua etaĝo; aliaj de la dua; aliaj de la tria, kaj tiel plu, la unuj stile duonŝercaj, kvazaŭ provante vualii, sub humoro ŝajna, la sincerecon de la peto; la aliaj, peze senhontaj kaj sen ortografio, sed ĉiuj aspirantaj saman celon, tio estas akiri pecon de l'fatala kaj beatiga ŝnuro. Inter la skribintoj estis, mi devas diri tion, plej da virinoj ol de viroj; sed ĉiuj, ja kredo min, ne apartenis al la klaso na alta kaj vulgara. Mi konservis tiujn leterojn.

"Kaj tian, subite, luno fariĝis en mia cerbo, kaj mi komprenis kial la patrino tiel ŝatis forpreni la spagon kaj per kiu komerco ŝi intencis konsoli sin."

(El "La Spleen de Paris", XXX)

XXXXXXXXXXXXXXXXXXXX

ANGULO DE LA POEZIO -

Waarom zou'k langen naar blinkende sterren
als bloeiende bloemen op 'arde nog staan?
Waarom mijn ogen naar droevende verten
nu wenden en starend ten onder te gaan?

Wijkende einders, en vluchtende ideeën,
verlangens die nimmer bevrediging geven!
Gedachten als smachtende zuchten van zeeën
in 't harte, dat treurt en het wee van het leven.

Ik wil in het leven de zonne zien rijzen
van 't schoone wat de wereld ne geven nog kan
En 'k wil niet den mist van het tastende grijpen
naar 't glanzende licht van wat wezenlijk kan!

(Klaar Tadat)

N.B.: wij geven recensie in volgend nummer.

ENIGMO DE LA PASKOKUNIKLO.-

La ĉarma besteto ŝi-flanke prezentas al vi ĉiuj krukvortoenigmaĵojn por ke vi agrable povu pasigi la Paskferion serĉante la solvo de ĝi.

Cu vi kontraŭstaros al la afabla invito de la bela kuniklo ?

Se ne, plenigu la kvadratetojn de la Paskovofiguro kaj ensendu la solvon al la prizorganto de la rubriko: ISERENTANT R., Steenweg op Blankenberge, 86 - Brugge.

Jen la difinoj:

- 1-a - de la dekstra al maldekstra flanko sur la 1-a linio: falsa dio (R)
- 2-a linio: superflua uzado de vortoj (R)
- 3-a linio: litero
- 4-a linio: konjunkcio - venas reje post fino de letero.
- 5-a linio: trinkaĵo (R) - peceto (R) - verbfinaĵo
- 6-a linio: neoficiala sufikso ofte uzata - pers.pron. - adv.
- 7-a linio: demanda vorteto - prefikso - neado en angla lingvo
- 8-a linio: litero
- 10- linio: situacio (R) - pers.pron. - kudrilego (R)
- 11-a linio: trinkaĵo (R) - trinkaĵo (R) - prefikso; 12-a linio: proprigi (R) - devigi (R); 13-a linio: spekulativa mezurilo (R); 16-a linio: komencaj literoj de fama franca E^o-verkisto - muziknoto; 17-a linio: idolo (R) - returnire; 18-a linio: unuo de elektra kontraŭstaro (R) - konjunkcio - muziknoto - posteulo (R); 19-a linio: revo - aparato por transversi fluaĵojn (R); 20-a linio: malfacile paŝi (R) - komencaj literoj de mondfama E^o - fari; 21-a linio: meteoro (R) - fiŝostoj (R); 22-a linio: subtera koridoro; 23-a linio: virino (R) - numeralo.

VERTIKALAJ VORTOJ (de maldekstra al dekstra flanko)

1-a linio: flago; 2-a linio: trusto (R) - imitema besto (R); 3-a linio: plendi; 4-a linio: publikaĵo (R); 5-a linio: lamenti (R) - simila (R); 6-a linio: kopii; 7-a linio: en iu loko - sablomonto (R); 8-a linio: konstruaĵo (R) - baza (R); 9-a linio: furaga herbo - adverbo de loko; 10-a linio: muziknoto - flanko de domo; 11-a linio: varmega vento (R); 12-a linio: geografiaj kartoj - fiksi; 13-a linio: kiu faras modernan profesion (R); 14-a linio: membro; 15-a linio: subite montrigu - mitologia figuro (R); 16-a linio: Europa ŝtato (R).

XXXXXXXXXXXXXXXXXX

KIEL ONI ĜIN ESPRIMAS EN ESPERANTO ? -

- Pli da bruo ol da faro - (veel geschreeuw maar weinig wol)
- Granda nubo, malgranda pluvo -
- Komenca inklino daŭras ĝis la fino - (jong gewend oud gedaan)
- Se Dio ne volas, eĉ Sanktulo ne helpas - (in God's zegen is alles gelegen)
- Tro rapida akcelo ne kondukas al celo - (haast en spoed zijn zelden goed)
- La lango prezentas kion la koro sentas - (waar het hart van vol is loopt de mond van over)
- Se koro pleniĝas, lango moviĝas -
- Kiu ŝteliston regalias, nen ŝteliston egalas (de heler is zoo goed als de steler)
- Kiu pri ŝtelo silentas, tiu ŝtelon konsentas -
- Dion fidu, ~~de~~ sed senfare ne sidu - (Help U zelf, zoo helpt U God)
- Peto kaj demando kondukas tra l'tuta lando - (met de hoed in de hand komt men door 't gansche land)